

LA
VERDA
STELO



ABoCo

**ESPERANTO
NEDERLAND**

**SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO**

decembro 2011

eldono de

**ESPERANTO
NOORD-NEDERLAND****ESPERANTO-KLUBO
GRONINGEN-DRENTE****prezidanto**

s-ro J.B. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. +3150 527 45 72

retadreso:

johan.swenker@xs4all.nl

sekretario

s-ino N.R. Kiel-Klunder
G. Sterringastraat 60
9728 VV Groningen
tel. +31505251436

retadreso: nrkielklunder@hotmail.com

kasisto

s-ro L. Staghouwer
Julianalaan 25
9781 ED Bedum
tel. +3150 301 40 15

retadreso: luitstaghouwer@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman
Westerein 14 a
8571 GB Harich (Frl)
tel. +3151 460 22 72

retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas
de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

J.B. Swenker, N.R. Kiel-Klunder
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com



Enhavo

- 3 Klubkunvenoj
- 4 Naskiĝtagoj
- Revo de kasisto
- 5 Pri la nordo
- 10 Martenfesto
- 11 La tri Vlasblommen
- Forpaso
- 12 Travintrado
- 13 School in Togo
- 14 Leganto skribas
- Dromen zijn bedrog
- 15 Intervjuo

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2012

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 12,50
Gezinslid	€ 6,25
Donateur (minimaal)	€ 7,00
Abonnement LA VERDA STELO	€ 7,00
Over te maken op ING banknr. 3822472 t.n.v. ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Bedum	

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van **ESPERANTO NEDERLAND**.

Vandaar dat wij hier ook het rekeningnummer ervan vermelden:
78 68 44 167 (TRIADOS-Bank), t.n.v. Esperanto Nederland te Nijkerk

Lidmaatschap (incl. abonnement Fen-X)	€ 30,00
Gezinslid	€ 10,00

Klubkunvenoj

januaro

- 5 vivanta gazeto (*kunportu gazeton*)
 19 desegni per komputilo (*Johan montros*)

februaro

- 2 gramatiko (*Wil gvidos*)
 16 jarkunveno (*la estraro parolos*)

marto

- 1 superjaro (*ĉiu serĉu informojn pri la temo*)
 15 alternsemajna ripetaĵo (*ni tradukos unu el ili*)
 29 plej ŝatata objekto (*ĉiu kunportu ion kaj parolu pri ĝi*)
kompreneble vi ankaŭ povus konfidi al ni kortuŝan travivaĵon

aprilo

- 12 rezervita por vi
 26 naturo (*Luit prelegos*)

majo

- 10 rezervita pro malbona vetero en la vintro
fino de majo kradrosti en Frislando

junio

- 9 jarkunveno Esperanto Nederland (*Utrecht*)

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj
 ŝanĝojn vi trovos en nia
 retejo sub la rubriko

Aktuale

<http://pingveno.nl/klubo>

Galgal Hamazalot aŭ kromaj paĝnumeroj

En ĉi tiu La Verda Stelo la paĝoj havas ne nur kutiman paĝnumeron, sed ankaŭ lunfazojn kiel indikilon. Ni uzis la dek unu bronzaĵn partojn de Galgal Hamazalot kiel paĝonumeradon.

Galgal Hamazalot estas arta objekto en la pavimo de Folkingestraat. Ineke montris bildon de ĝi kiam la temo de la kluba vespero estis 'statuoj'.



januaro

- 4 s-ino W. van Ganswijk
- 18 s-ino K. Balk
- 27 s-ino I. Emmelkamp
- 30 s-ino A. van der Veen
- 31 s-ino J. Postema

februaro

- 11 s-ro H. van Kappen
- 18 s-ino S. Czeswinska
- 28 s-ro L. Staghouver

marto

- 24 s-ro B. Begeman

aprilo

- 1 s-ino T. Bulk-Beenen
- 6 s-ro E. Evenhuis
- 6 s-ino P. van Kappen-v/d Kamp
- 7 s-ino A v/d Meer
- s-ino A. Hooymans
- 17 s-ino G. Heide

Revo de kasisto.

"Estas meze de aprilo 2012 kaj ĉiuj membroj kaj abonantoj jam pagis la kotizon."

Kia afabla revo, ĉu ne? Nu bone, eble ne ĉiuj, sed tamen preskaŭ ĉiuj. Bedaŭrinde ankaŭ en adaptita formo tiu revo verŝajne ne veriĝos. Mi scias. Kompreneble, ĉiu povas fojfoje forgesi pagi la kotizon ĝustatempe. Tio okazis ankaŭ al mi. Tial mi ĉagreniĝis, ĉar tio ne plaĉas al mi.

Ĉi tiun jaron mi devis sendi leteron al preskaŭ kvaronon de la membraro kaj abonantaro, ĉar pagi la kotizon oni forgesis. Al kelkaj mi devis sendi leteron eĉ dufoje. Ankaŭ tio ne plaĉas al mi.

Mi petas de vi ĉiuj pagi la kotizon en la unua kvaronjaro de 2012. Tiunmaniere almenaŭ vi ja kunlaboros verigi la revon de la kasisto.

Kiom vi pagu kaj en kiun konton vi povas legi sur paĝo 2 de la informilo.

Anticipe dankas vin Luit Staghouver (kasisto)



Pri la nordo

1 septembro 2011

La temo de ĉi tiu unua kunveno post la ferioj estas: *pri la ferioj.*

Johan montris foton de la 50-jariĝo de la Groningena Esperanto-klubo (1925-1975). La demando estas: kiuj estas la personoj sur la foto?

Wil vizitis s-inon Leeuwerke-Kiers, s-inon Adri Oosterwijk, kaj s-inon Bets Dodebier, kiu tre diligente sin ekzercas, por ke ŝi denove povu iri sen problemoj.

Nome de la vizititoj Wil salutas la kunvenantojn.

Luit rondirigis poŝtkarton, kiun sendis kelkaj nederlandaj partoprenantoj de la ĉi-jara UK. Estis tre pluvriĉa kongreso. Bedaŭrinde la kongresejo troviĝis ekster la urbo, kaj pro tio nur malmultaj loĝantoj de Kopenhago eksciis pri la Esperanto-kongreso.

Wil montris multajn fotojn de la kongreso kaj de kelkaj vizititaj vidindaĵoj. Post la kongreso ŝi flugis al Prago kaj restis tie kelkajn tagojn. Poste ŝi veturis al Podebrady por partopreni la KELI-kongreson. Sian ĉeeston en Prago kaj Podebrady ŝi pruvis per pluraj fotoj. Kompreneble ŝi raportis ankaŭ pri siaj travivaĵoj. Si vizitis interalie muzeon, en kiu estas nur vidindaĵoj, kiuj konsistas el homaj ostoj kaj kranioj.

Nelly kaj ŝia edzo feriis kelkajn tagojn en Noordwijk aan Zee okaze de sia 25-jara geedziĝfestoj.

Wiebren veturis per aŭto al Kopenhago, kaj dum la kongreso li restis en hotelĉambro en la 19-a etaĝo. La hotelo situis

proksime al la kongresejo.

Malplaĉis al Wiebren la konduto de pluraj aŭskultantoj, kiuj dum la inaŭguro kriis al la parolantino nome de Unesko, ke ŝi parolu Esperanton anstataŭ la danan. Poste la parolado estis (laŭplane) tradukita en Esperanton. Wiebren estas kontenta pri la kongreso ĝenerale.

Luit Staghouver

15 septembro

La 15-an de septembro ni unue parolis pri diversaj aferoj. Kiel ĉiam, la protokolo de la pasinta kunveno estis voĉlegita. Tio rezultigis en pliaj rakontoj pri la pasinta UK. Dum la internacia vespero *Kim Henriksen* kantis *mi estas sola*. Kaj 1500 homoj kunkantis, ke ili estas solaj ☺. Por Wil kaj Wiebren, kiuj la pasintan fojon parolis pri la UK, tiu kantisto Kim ne estis speciala. Sed Kim estas bona amiko de Ineke, kaj por ŝi lia kontribuo al la internacia vespero estas memorinda.

Ineke parolis pri la nova kd de *Kajto*, kiu nomiĝas *duope*, ĉar Kajton nuntempe konsistigas la duopo Nanne kaj Ankie.

La plej grava afero dum la UK kompreneble estas la disdonado de atestoj al homoj, kiuj jam dum 40 jaroj estas membroj de UEA. Nia membro Ineke Emmelkamp estis unu el la 4 aŭ 5 homoj, kiuj ricevis tian ateston. Sed prefere ŝi estus ricevinta ĝin poŝte.



La temo de la vespero estis *statuoj en Groningeno*. Wil kunportis preskaŭ antikvan ilon por montri al ni kelkajn statuojn. Ŝi montris al ni lumbildojn pri statuoj, precipe el la periodo ĝis 1990. Precipe ĉar la lumbildojn ŝi faris tiam. La artaj objektoj, kiujn ŝi fotis estas plejparte klasikaj statuoj: bronzaĵoj aŭ ŝtonaj objektoj. La modernajn objektojn, kiel ekzemple la altatensia masto apud la A28 en la sudo de Groningeno, ni do ne vidis.

Wil montris interalie: *'t Peerd van Ome Loeks* el 1959, kio estas ĉevalo el kvarcbe-
tono far *Jan de Baat*. Ĝi estas la plej konata statuo de Groningeno.



Landbouw en veeteelt (agrikulturo kaj brutbredado) estas bronza statuo el 1953 far *Wladimir de Vries* kaj montras nudan virinon kaj bovidon. Pro la nuda virino la groningeranoj nomas la statuon *Blote Bet* (nuda Ninjo).



Apud la Emma-ponto staras bronza statuo farita en 1959 de *Willem Reijers*. Ĝi similas drakon el radoj, dentradoj kaj pneŭmatikoj. Nur post la kunveno ni eltrovis per Interreto la nomon de la statuo: *Verkeer* (trafiko).

rigardu http://nl.wikipedia.org/wiki/Lijst_van_beelden_in_Groningen-Binnenstad



Ineke uzis pli modernan metodon por montri al ni kelkajn statuojn en Groningeno. Ŝi printis kelkajn bildojn de la retejo staatingroningen.nl.

La arta objekto *Galgal Hamazalot* el 1997 far *Joseph Semah* troviĝas en la pavimo de Folkingestraat. Ĝi montras la dek unu lunfazojn: de nova luno ĝis plena luno, kaj inverse de plena luno ĝis nenio. Kune ili iomete similas okulon ((o)), kaj la plenan lunon en la mezo figuras la iriso.

Ankaŭ la aliaj artaĵoj, kiujn Ineke montris al ni, staras en Folkingestraat. Ili ĉiuj rilatas iel al la judoj, kiuj vivis tie antaŭ la dua mondomilito.

Johan

29 septembro

Temo de la vespero: *poemoj*.

Luit salutas la ĉeestantojn nome de Bets Dodebier kaj raportas pri la situacio de *Joseph* kaj pri sia korespondado kun kelkaj alilandaj esperantistoj.

Wil ricevis de Tiny Bulk leteron kun la nomoj de la personoj, kiujn vidigas la foto farita okaze de la 50-jariĝo de la Groningena Esperanto-klubo (1925-1975).

Wil sendis retmesaĝon al Harm Roeters kaj demandis lin, ĉu lia amiko (kiu kunveturis al Kopenhago) eventuale interesiĝas pri Esperanto-kurso.

Nelly kaj Johan okupiĝis dum du tagoj pri la kompilado de nia informilo *La Verda Stelo*. Rilate al la temo de ĉi tiu vespero Wil konfesas, ke poemoj ne estas ŝia preferata temo. Ŝi preferas poemojn por infanoj, ĉar tiujn poemojn oni povas kompreni.

Wil kunportis plurajn libretojn, i.a. ABC-libreton en Esperanto. Ŝi laŭtleĝis poemon pri neĝhomo, kaj poemon, kiun ŝi mem tradukis el la nederlanda: *La vasta mondo*.

Nelly kunportis du poemojn en la nederlanda lingvo. Unu el tiuj poemoj ŝi tradukis en Esperanton. Ĝi temas pri flugmaŝino el betono. La konstruinto asertas, ke la flugmaŝino ja povas flugi, sed ne povas trairi la fenestron.

Poezio estas por mi la rakonto

Kiun iam iu rakontis al mi

Pri viro kiu sur sia subtegmentejo

Ĉarpentis betonan aviadilon,

Kaj fiere diris al ĉiu

Ĝi estas aviadebla,

Sed ne povas preteriri

La tegmentfenestron



La alian poemon ŝi opinias netradukebla. Estas poemo el la serio *Plint*. En la poemo gravas aliteracio kaj vortludo.



Johan laŭtleĝas la poemon *Mi ne volas el-litiĝi* de *Bertram Potts*. Estas konata teksto. La tekston muzikigis Nanne Kalma kaj la kanto aŭdeblas per la unua disko de *Kajto* (1989).



Luit laŭtlegas la infanpoemon *Pasera kanto*. Nederlandaj paseroj diras "Tjielp tjielp-tjielp tjielp" ktp. (poemo *De Mus far Jan Hanlo*), sed en Esperanto ili kantas *Ĉik-ĉirik-ĉiri-lik, ĉiri-ĉiri-lik* (poemo de la bulgarino *Ljuba Bojaĝieva*). Li laŭtlegas ankaŭ poemon de *Tibor Sekelj*. Ĝi temas pri la *diluvo* (zondvloed) kaj *Noa*, kiu savis multajn bestoparojn per sia barko. La lasta strofo de tiu poemo tekstas:

*Kaj kiam fine la savitaj vortoj
eliris sur firman teron Araratan*

de ie supre tondra voĉo aŭdiĝis:

*"Multobliĝu transformiĝu kunligiĝu
kadukiĝu rejuniĝu kaj disfloru
kaj malamu unuj la aliajn."*

Ŝajne la homaro bone komprenis precipe la komision en tiu lasta verso.

Poste Wil laŭtlegis la poemon *Du manoj* (blanka kaj bruna, unu kun ringo, unu kun ĉeno). Alterne ni tradukis verson de tiu poemo en la nederlandan.

Luit

13 oktobro



Post kelkaj tagoj Ineke prelegos pri Esperanto, kaj ŝi uzos sian kolekton da ABC-libroj kiel gvidilon. La malferma vespero estis granda provludo por ŝi.

La du gastoj naskiĝis en Indonezio, kaj foliumis la ABC-libron por indoneziaj infanoj ridetante. Tiel same mi legis la ABC-libron en la mastriĥta dialekto.

Hazarde Wil prenis la paĝosignon pri Esperanto kaj komencis klarigi. Do tiel, kiel ŝi iomete instruis dum ĉiu malferma vespero. Sed ĉi-foje la libro, el kiu ŝi instruis estis malgranda informilo pri Esperanto.

Johan



27 oktobro 2011

Anoncita por ĉi tiu kunveno estis preleganto. Antaŭ unu semajno ni jam estis avertitaj, ke preleganto ne venos, do estis decidite kune spekti Esperanto-filmon. Luit kunportis du bendojn kun la filmoj: *Spuroj de la avo* kaj *Kinarto kaj ni*.



Johan rakontis, ke li ricevis de iu sinjorino kelkajn malnovajn Esperanto-librojn, kiuj iam apartenis al ties edzo. Ni parolis pri la temo: *Kiu ankoraŭ interesiĝas pri malnovaj Esperanto-libroj?* IEI en Hago sciigis, ke malnovaj (neuzitaj) Esperanto-libroj estas malaltpreze aĉeteblaj ĉe ili. Ineke rakontis, ke forpasis en Hago s-ino *Rie van der Kooij-Waal*.

Luit atentigis nin, ke Bets Dodebier festos post kelkaj tagoj sian 80-jaran naskiĝdatrevenon. Ŝi invitas nin festi tion kune post kvar semajnoj. Tiam do ne okazos la kutima klubkunveno. Venontsemajnfine okazos la studsemajnfino en *Hoek van Holland*. Neniu el nia klubo partoprenos en ĝi. Ni diskutis pri *Projekto 125* aŭ *1-2-5*. Antaŭ 125 jaroj aperis la unua Esperanto-libro. Pro tiu fakto oni intencas mondscale fari reklamon por Esperanto per nova 125-taga interreta kurso kaj unu el la sociaj komunikiloj.

Ineke rakontis, ke 11 koreanoj gastloĝas nun en Herzberg. Ili estas lernemaj komencantoj. Ĉu eble ni povus inviti kelkajn veni al Groningen? Alia novaĵo el Germanio estas, ke en Emden estas 99 studen-

toj, kiuj lernas Esperanton. Alia sciinda fakto estas, ke UEA ĉi-momente aktivigas ĉe Unesko. En Mennorode Ineke prezentos post nelonge prelegon antaŭ membroj de MENSA. La temo estos A-B-C-libretoj kaj Esperanto.

Tiam estis tempo por spekti filmon.

Ho ve! Johan kaj Luit ne sukcesis montri ĝin al ni. Tial Luit voĉlegis la protokolon de la antaŭa kunveno, rakontis pri vizito de Monica kaj li en Putten kaj montris kelkajn eltonditajn gazetartikolojn, pri kiuj ni vigle diskutis.

Wil



Marten-festo 2011

Ĉu vi faris ion specialan dum la Marten-festo en 2011? Mi estis en mia laborejo kaj rigardis la telefonon, kiu estas moderna aparato kaj montras daton kaj horon. Estis iomete post la dek-unua, kaj mi decidis festeti la gravan momenton per kafo. Mi demandis la kolegon kian kafon li preferas. Li povus respondi petante kafon nigran. Sed kutime ni respondas per la ĉifro, kiun ni tajpu en la kafaŭtomaton. Nigra kafo havas numeron 11.

Do precize la 11-11-11-a je la 11:11:11-a ni trinkis kafon "11" "11". Tiu lasta indikas: pli fortan.

Kiam mi venis hejmen, mi kantis pri Sankta Marteno. La tutan vesperon neniu infano venis por kanti.



Ĉar mi estis la sola, kiu perlaboris por la Marten-festa frandaĵo, mi ricevis ĉion, kion mia edzino aĉetis. Bonguste!

Johan



'La tri Vlasblommen'

En Groningen staras domo, Hoge der A 7, sur kiu legeblas la familia nomo de Wil van Ganswijk-Vlasblom. Ĝi datiĝas de la 14-a jarcento. La domo tiam konsistis el ŝtona duetaĝa konstruaĵo de 11 je 6 metroj.



Ĝi estis unu el la iom malgrandaj aŭ mezgrandaj domoj en ĉi tiu urba parto. Fine de la 15-a jarcento estis konstruita nova ĉambro je la malantaŭa flanko de la domo. Verŝajne pli poste estis konstruita sur ĝin etaĝo. Nur en la 17-a jarcento oni faris kelon. Malantaŭ la domo, en la ĝardeno, staris kelkaj unu-etaĝaj konstruaĵoj, en kiuj troviĝis laborejoj.

Meze de la 17-a jarcento okazis denove granda rekonstruo, kiun farigis sinjorino *Hester van den Broecke*, vidvino de *Reinder Dercks Vlasbloem*. Ŝi havis 3 infanojn. Pro tio la tri floroj sur la fasado kaj la nomo *Vlasblom* malsupre sur la ŝildo. Fine de la 18-a jarcento la fasado estis denove iom modernigita kaj malantaŭ la

domo estis konstruitaj du ĝardenĉambroj fare de la tre konata arkitekto *Berlage*. La nunaj posedantoj, la familio *De Jongh-de Vey Mestdagh* renovigis la domon tiel, ke ĝi nun belaspektas.

Wil

Forpaso



Harmina Leeuwerke-Kiers, 93-jaraĝa, animo de nia klubo dum multaj jaroj, forpasis la 5-an de oktobro 2011 en flegejo *De Walakker* en Zuidlaren.

Malgraŭ ŝia longedaŭra membreco preskaŭ neniu klubano konis ŝin. Ŝi ne ĉeestis klubkunvenojn dum multaj jaroj, escepte unufoje antaŭ tre longe. Tiam montriĝis, ke Niza Kuiterman kaj ŝi bone konis unu la alian.

Lastjare Wil van Ganswijk kelkfoje vizitis ŝin nome de la klubo, kion ŝi tre aprezis. Kvankam ŝia sanstato lastatempe pli kaj pli malboniĝis, ŝi tamen forpasis neatendite. Ke ŝi ripozu en paco.

Wil



Travintrado.

Ekzistas homoj, kiuj veturas al pli suda lando por eskapi la vintran malvarmon. Eble tio estas natura reago al la ŝanĝiĝintaj ĉirkonstancoj, ĉar ne nur homoj iras suden. Ankaŭ multaj birdoj, kiuj dum la pli varmaj monatoj de la jaro restis en nia lando flugas suden. Ekzistas eĉ papilioj, kiuj preferas flugetadi dum la vintro en la mediteranea regiono. Venontan someron iliaj idoj denove iros norden. Aliaj specioj de papilioj restas en nia lando. Estas specioj, kiuj travintras kiel papilio, sed aliaj specioj travintras kiel ovo, raŭpo aŭ krizalido. Ĝenerale la mondo de insektoj estas tre interesa kaj la travintrado de pluraj specioj de insektoj estas eĉ pli fascina.



Abelreĝino

Abelpopolo travintras en nesto aŭ en abelujo. Sed dum la travintrado la popolo konsistas nur el inaj abeloj: abelreĝino kun multaj "laboristinoj". La virabeloj mortas antaŭ la komenco de la vintro. Jam frue en la nova jaro, kiam la temperaturo estas minimume 12 gradojn, la laboristinoj forlasas la neston por irpreni polenon kaj nektaron por nutri la abelreĝinon.



Pro tio la reĝino demetas pli kaj pli da ovoj, po 1.500 ĝis 3.000 tage. En la daŭro de unu jaro reĝino povas demeti 200.000 ovojn. Tiom da ovoj signifas, ke poste eloviĝas multaj novaj abeloj.

En majo abelpopolo konsistas el 60.000-80.000 laboristinoj, kelkcent virabeloj kaj nur unu reĝino. Iom post iom la nesto / abelujo iĝas tro malgranda kaj la abelreĝino forlasas ĝin kaj duono de la laboristinoj sekvas ŝin. Ili serĉas alian neston. En la malnova nesto eloviĝas kelkaj novaj reĝinoj. La novaj reĝinoj forlasas la neston por pariĝi kun deko da virabeloj. Post la pariĝo nur unu reĝino povas reiri al la nesto, la aliaj devas serĉi alian lokon por fondi novan popolon. Kaj la virabeloj ne plu estas utilaj, pro kio ili estas forpelataj aŭ mortigataj. Neniu el ili vivas sufiĉe longe por travintri.



Grandbildo de ordinara vespo (Vespula vulgaris)

Sed la travintrado de la konata flavnigra vespo estas eĉ pli eksterordinara. Travintras nur la fekundigitaj vespreĝinoj. Antaŭ la vintro mortas ne nur la virvespoj, sed ankaŭ la laboristinoj. Post la vintro la reĝino konstruas la unuan parton de nesto kaj demetas dek ĝis dudek (fekundigitajn) ovojn, el kiuj eloviĝas laboristinoj. Tiuj ne povas produkti ovojn.

Ili pligrandigas la neston, por ke la reĝino povu demeti pli da ovoj, kaj ili prizorgas la nutradon de la reĝino kaj la larvoj. Unue

eloviĝas nur laboristinoj, kaj en la aŭtuno la reĝino demetas ankaŭ ovojn nefekundigitajn, el kiuj eloviĝas virvespoj. Tiuj pariĝas kun la junaj reĝinoj kaj poste mortas. Pro la frosto mortas preskaŭ la tuta popolo, nur la fekundigitaj junaj reĝinoj povas travintri. En la sekva jaro ili devas fondi novajn popolojn.

Luit Staghouver

Steunfonds voor School in Togo – Nieuw rekeningnummer

De school heeft elke bijdrage hard nodig en daarom hebben we besloten samen met *Stichting Triodos Foundation* een fonds voor de school in te richten onder de naam *STF Een School in Togo* (STF betekent Steunfonds) met een eigen bankrekening bij *Triodos Bank*. De samenwerking past goed bij onze ideeën en zorgt voor continuïteit.



Wij willen u vragen ons te helpen een succes te maken van het nieuwe steunfonds voor Een School in Togo.

Het nieuwe rekeningnummer is:
78.67.78.210 t.n.v. STF Een school in Togo te Zeist.

Wij zijn blij met elke bijdrage en elk bedrag wordt beloond met de Triodospremie van € 10.

Wij zullen u vanzelfsprekend op de hoogte blijven houden van de ontwikkelingen van onze school.



Bij voorbaat heel hartelijk dank voor uw betrokkenheid en uw financiële steun.

<http://eenschoolintogo.nl/nieuw/info.php>

Hans Bakker



Leganto skribas: pri la 50-a jubileo

Je mia surprizo mi trovis la foton el La Verda Stelo, kiun mi kunprenis al la kunvenvespero. Staras la demando: kiuj estas la personoj sur la foto? Kompreneble tion mi ankoraŭ scias. De maldekstre al dekstre staras *s-ro Abbas, Ge Abbas de Hoop, s-ro v.d. Horst, Jaap Koning kaj s-ro Albers*.

Mia edzo ornamis la salonon per floraĵoj apud la estraro kaj sur la tabloj. Li ja estis floristo. Mi trovis ankoraŭ alian memoraĵon: la programojn, kiujn mi enmetis; mi mem elpensis kaj desegnis ilin. Tiuj staris sur la tabletoj kaj poste ĉiuj programoj estis for (kunprenitaj de la ĉeestantoj). *Abbas kaj Ge de Hoop* renkontis unu la alian en la klubo kaj poste geedziĝis. Ankaŭ *s-ino Albers* estis tre kara samideano.

Kun koraj salutoj, *Tinie*



Dromen zijn bedrog.

Dat het bovenstaande een waarheid als een koe is, daarover zijn we het waarschijnlijk wel eens. Maar dat betekent nog niet dat het soms prettig is om een beetje te dagdromen. Stel je voor, je bent penningmeester en iedereen betaalt zijn/haar contributie op tijd. Je hoeft niemand een herinnering te sturen. Dat is toch een mooie droom.

Nee, niemand hoeft mij te vertellen dat die droom niet uitkomt. Dat weet ik ook wel, ik ben al een "paar jaar" penningmeester en dus "ervaringsdeskundige" zoals we dat tegenwoordig noemen. Maar toch, stel je eens voor dat iedereen wél op tijd betaalt. En met op tijd bedoel ik dan in het eerste kwartaal van 2012. Een enkeling heeft zelfs al betaald (hartelijk dank), tijdig betalen is dus geen utopie.

Wil je ook op tijd betalen en zit je niet te wachten op een herinnering, betaal dan binnenkort het verschuldigde bedrag. Op pagina 2 staat hoeveel je moet betalen en naar welke rekening het bedrag kan worden overgemaakt. Alvast mijn oprechte dank voor de medewerking.

Luit Staghower (penningmeester)



Unu semajnon antaŭ la malferma vespero ni ĉiam forsendas gazetaran novaĵon al la gazetaro en Groningen, Frislando kaj Drente. Kelkfoje ĝi aperas en *Gezinsbode*. Ĉi-jare redaktoro de *Dagblad van het Noorden* telefonis al Johan kaj faris intervjuon. La artikolo aperis la 8-an de oktobro sur paĝo 9, la ĉefpaĝo de la groningena kajero de tiu gazeto.

'Wij esperantisten zijn misschien te bescheiden'

VRAAG & ANTWOORD JOHAN SWENKER

Esperanto is nog niet verdwenen. Maar de groep die deze bedachte taal spreekt en schrijft, vergrijst. Vandaar de open avond van Esperanto Noord-Nederland, volgende week, in Groningen. Voorzitter Johan Swenker legt uit.

Door Hans Knijff

Domme vraag waarschijnlijk, maar zijn er nog wel mensen die Esperanto spreken?

"Helemaal geen domme vraag. Het antwoord is: ja. Maar wij timmeren misschien te weinig aan de weg. Daarom houden we ook de open avond. Wij hebben nu veertig leden en dat zijn vooral ouderen. Bij Esperanto Nederland zijn zo'n vierhonderd mensen aangesloten."

Wat zijn dat voor mensen, de esperantisten?

"Het is van alles door elkaar, ho-

ger- en lageropgeleiden. Onze leden hebben over de hele wereld contacten via internet. Tijdens vakanties zoekt men elkaar op."

Ik las ergens dat wereldwijd twee miljoen mensen nog altijd het Esperanto beheersen. Dan is Nederland kennelijk niet echt een Esperanto-land.

"Polen is volgens mijn weten hét Esperanto-land. De bedenker van het Esperanto, Ludwik Lejzer Zamenhof, was ook een Pool."

Als je je als lid aanmeldt, krijg je dan meteen les in de taal?

"Je kunt op diverse manieren Esperanto leren. Thuis bij een docent van ons bijvoorbeeld. Dat is niet duur, je betaalt alleen je werkboek. Het kan ook *online*. De uitspraak is niet het allerbelangrijkst. Als je een woord net iets anders uitspreekt, ben je nog altijd verstaanbaar."

De open avond is donderdag 13 oktober van 19.45 tot 21.45 uur, Willem Dreesstraat 1 in Groningen.

Vrolijk Kerstfeest en een Gelukkig Nieuwjaar.

Noflike Krystdagen en in protte Lok en Seine yn it Nije Jier! Joyeux Noël et Bonne Année. Fröhliche Weihnachten und ein glückliches neues Jahr. Merry Christmas and a happy New Year. Feliz Navidad y Próspero Año Nuevo. God Jul och Gott Nytt År. Wesołych Świąt i Szczęśliwego Nowego Roku. Kelleme s Karácsonyi Ünnepeket és Boldog Új Évet. God jul og godt nytt år. Merry Christmas and a happy New Year. Joyeux Noël et Bonne Année. God Jul och Gott Nytt År. С Новым годом и с Рождеством Христовым. 聖誕快樂, 新年進步 Zieëlige Kris mes en e Ziëlig Nuijaor. God Jul och Gott Nytt År Fröhliche Weihnachten und ein glückliches neues Jahr. Feliz Navidad y Pr

Ĝojan Kristnaskon kaj Feliĉan Novjaron.

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO – taal zonder grenzen